Aprilo 1954 Jarkolekto 51 No. 435

# ESPERO KATOLIKA

## KOMÚNIKOJ PRI „NIA XXVa" EN AMSTERDAM

(de sabato 31. Julio ĝis ĵaŭdo 5. Aŭg. 1254)



*Nia kongresejo en Amsterdam.*

### PROVIZORA PROGRAMO.

| TAGO | HOROJ | PROGRAMO |
|---|---|---|
| 31a Julio | 15.00 | Inaŭguro kaj Interkonatiĝo |
| 1a Aŭg. | 09.00 | Sankta Meso; Poŝte Fotografado |
| | 19.30 | Boatveturado tra la kanaloj kaj havenoj |
| 2a Aŭg. | 9.00 | Sankta Meso |
| | 11.00 | Sekciaj kunvenoj |
| 3a Aŭg. | 9.00 | Sankta Meso |
| | 14.00 | Jarkunveno de I.K.U.E. en Haarlem (salono disponigita de la U.K.) |
| | 19.30 | Teatro ("Arta" vespero) |
| 4a Aŭg. | 9.00 | Sankta Meso |
| | 11.00 | Ekskurso al la Floraŭkcio en Aalsmeer kaj la aerodromo „Schiphol" |
| 5a Aŭg. | 9.00 | Sankta Meso |
| | 11.00 | Sekciaj kunvenoj |
| | 14.00 | Solena Fermo de la Kongreso |

Je la 6a kaj 7a de Aŭg.: postkongresaj ekskursoj al Den Haag, Scheveningen, Rotterdam.

Pastro Ludwig Thalmaier faros prelegon, tre verŝajne pri la temo: „Esperanto kunigas la homojn spite de la diverslingveco".

La L.K.K. intertraktas ankoraŭ kun aliaj parolontoj.

**Kongreskotizo:** ĝis 1. majo 1954: ned. guld. 9,—. Por ĉiu monato pli poste, unu ned. guld. pli. La duono por blinduloj, junuloj kaj dua, tria k.t.p. samfamiliano. Sekretario-kasisto: G. Ellerman, de Clercqstr. 42, Amsterdam W (poŝtkonto 462266).

## NI KAJ LA PACOPREĜEJO EN HIROŜIMA.

Ni scias, ke en Hiroŝima, Japanujo, la malfeliĉa viktimo de l'unua atombombo ĵetita sur loĝejaro, estas konstruata katolika preĝejo por akceli la pacon inter la homoj kaj nacioj. Tiun ĉi repacigan entreprenon partoprenas diversaj popoloj kaj konfesioj.

Nun mi legis pri la intenco, en tiu preĝejo starigi la flagojn de ĉiuj nacioj, por simboligi la novegajnitan solidarecon de la nuntempaj popoloj. Demandiĝas nun por ni esperantistoj, ĉu inter tiuj flagoj, ja signantaj la dispartitecon de la homaro, ne staru ankaŭ la flago de la verda tutmondo, nia flago, por inter ili daŭre prediki, ke la popoloj pli bone harmonios, se ili uzos Esperanton por siaj interrilatoj, pro la tialoj jam sufiĉe konataj.

Do, la esperantistaro preparu tiun invicigon de sia simbolo inter la diversnacia flagaro en la pacopreĝejo de Hiroŝima kaj niaj japanaj gesamideanoj akceptu la aranĝon de l'afero, helpataj de la tutmonda esperantistaro. Eble la 39.UK en Haarlem oficiale subtenos la ideon en taŭga maniero. Ankaŭ UL estus kompetenta por simpatio. Kie temas pri la paco, Esperanto kaj ĝiaj anoj ne manku! Konkretaj proponoj pri la plenumo petataj!

Plian kordeziron mi malkaŝu! Ŝajnas al mi, ke la Dion kredantaj samideanoj ĉieaj ne konscias pri la plej efika rimedo por akcelado de sia afero, pri la potenco de la preĝado. Mi tial atentigu ilin pri ĝi kaj sugestiu, ke okaze de la proklamo de nia ĉiela patrono papo Pio X. beata kiel sanktulo ĉiu el ni faru novenon je ties honoro, petadante, ke li venkigu Esperanton kiel eminentan pacilon, novenon renovigotan okaze de la ĝenerala kunveno de UNESKO en Montevideo, kie niaj samkredanaj samideanoj instigu siajn samurbanojn, dum tiu por ni gravega konsilado Dion petegadi, ke Li direktu la mensojn kaj korojn de la deputitoj al tiu ĉefkunveno ĝis decido favora al Esperanto.

D-ro A. Halbedl.

*

## PACO — SIGNO.

La 13a de Marto estis la kvindeka datreveno de la starigo de kolosa statuo de „Kristo de la Andoj" sur unu el la plej altaj montoj de Kordilio. Ĝi staras en bena gesto inter Argentinio kaj Ĉilio antaŭ la vasteco de la Pacifika Oceano. Ĉar tie temas ne nur de erekto de monumento, valoras ke oni memorigu tiun datrevenon.

En la fino de la 19a jarcento Argentinio kaj Ĉilio pro vundita memamo kaj intereso pretis ekmiliti. Neevitebla ŝajnis jam la katastrofo, kiam Lia Ekscelenco Mons-ro Benavente, episkopo de Sta. Johano de Cuyo en Argentinio, je la Paskofesto de 1900 de sur la katedro admonis al paca intertraktado. Tio estis la komenco de vera packampanjo, kiun la kuraĝa prelato entreprenis en la tuta lando. En Ĉilio la Episkoparo imitis tiun kampanjon kaj fine aliiĝis la opinio de la du popoloj, iliaj registaroj decidis submeti sian disputobjekton al la arbitrado de la Reĝino Viktoria. Tamen intertempe mortis la brita reĝino, sed Eduardo la VIIa donis la deziratan solvon.

La du registaroj akceptis la verdikton kaj ĉesigis la armadon; tiamaniere la al fabrikado de armiloj destinitaj monsumoj povis esti uzataj por celoj de sociala intereso.

Por rememorigi tiun eventon oni starigis statuon de Kristo je alteco de 4200 metroj, sur la limo kiu dividas la du landojn. Tiu bronza statuo estas la verko de la argentina skulptisto Mateo Alonso. Ĝi estis inaŭgurata la 13an de Marto 1904.

trad. Frato Arni Decorte.

## LA MEDICINA HISTORIO DE LOURDES — IV

Mi nomis la ,,Asocion de la Kuracistoj-Amikoj de Lourdes''. En 1925 la Kuracistoj-Amikoj de Lourdes fondis la ,,**Asocio Medicina Internacia de Nia Sinjorino de Lourdes,**'' resume: A. M. I. L. La kuracistoj kiuj volas esti ,,Anoj'' petas al la Prezidanto sian aniĝon. La necesaj kondiĉoj estas: esti kuracisto (aŭ studento); akcepti la regularon, kiu necesigas ke la kuracisto-ano estu bontona koncerne siajn kunfratojn de la Oficejo kaj la malsanulojn ekzaminotajn; ke li estu movata de la scienca sento kaj ke li pagu moderan kotizaĵon, kiu lasta permesas la prezidanton pagi la kostojn por la konservado de la ejoj kaj la elspezojn por la necesaj medikamentoj, bandaĝadoj, radio-filmoj, kaj ankoraŭ tiujn de la Bultenon-presado, korespondado ktp. Efektive, senluksa Bulteno estas presata kaj sendata al ĉiuj Anoj de la Asocio, de tempo al tempo (nuntempe ĉiutrimonate). Per ĝi la Anoj konas la veron pri la Asocio, la eksterordinarajn resaniĝojn tie konstatitajn, la proponetojn kaj kritikojn prezentitajn, ktp. La prezidanto donas al la Anoj specialan insignon.

La kuracistoj, Anoj aŭ ne de la Asocio, havas tre rimarkindan privilegion: sekvi la Sanktan Sakramenton tuj post la Episkopoj, dum la ĉiutaga procesio: tiel ili venas antaŭ ĉiuj malsanuloj metitaj sur la Parada Placo de la Grotbienaro — la Esplanado. Do, la ne-katolikaj kuracistoj havas la samajn rajtojn kiel la katolikaj. Se iu kuracisto deziras viziti la hospitalon aŭ la banbasenojn, li estos aŭtoritata de la Prezidanto.

Aktuale, nia Asocio enhavas Kuracistojn-Anojn en preskaŭ ĉiuj landoj; kaj en ĉiu nacia lando iu prezidanto-deligito estas peranto inter siaj sampatrujanaj kunfratoj kaj la Prezidanto de Lourdes. Konsekvence utilaj esploradoj pri la sciencaj studoj aŭ pri la malsanuloj estas eblaj.

Tie ankaŭ estas Biblioteko kie la kuracistoj povas esplori medicinajn verkojn, francajn, anglajn, germanajn, italajn ktp. Estas ankoraŭ plurlingvaj vortaroj kaj eĉ ,.**La Esperanta teknika medicina Vortaro**'' verkita de D-ro BRIQUET el Lille (Francujo); tiun Vortaron —sen analogio, mi kredas— posedas multaj esperantistaj kuracistoj en la tuta mondo. (D-ro BRIQUET tre konita en la medicinaj medioj esperantistaj de Tutmondo, mortis en 1953; li estis donace proponinta ekzempleron al nia Oficejo, ĉar li estis ano de nia Asocio. Tiu ,,Vortaro'' estas ankoraŭ trovebla ĉe D-ro P. Kempeneers, 106 rue Général Lotz, Uccle-Bruxelles, Belgujo).

Ni do vidis ,,La Kuracistojn'' kaj la ,,Asocion de la Kuracistoj de Lourdes''.

Ni vidos, pluen, la **Agmanieron** de la Medicina Korporacio pri la Lourdesfakto.

(Daŭrigota.) D-ro Paul Léger.

N.B. En ĉapitro III paĝo 23, 13a linio troviĝas ĝena preseraro; bonvolu legi: **Tio estas scienda.**

*

**Seminario por Cseh-metodaj geinstruistoj** okazos en Haarlem tuj antaŭ la kongreso de UEA (29-30-31 Julio) kondiĉe ke sufiĉe multaj e-istoj aliĝos. Gvidanto: s-ro Andreo Cseh, kiu klarigos la metodon kaj la manieron prezenti la lecionojn. Destinita nur por personoj kiuj jam scias E-on. Kotizo: 6 ned.guld. aŭ 24 steloj; por du personoj el la sama familio 10 guld. aŭ 40 st. kune. Aliĝo: kiel eble plej baldaŭ, sed nepre antaŭ 1.5.54; la kotizo estas samtempe pagenda al Intern. Esp.Inst. Riouwstr. 172, Den Haag, Ned. aŭ al la landaj reprez. de U.L. De multaj flankoj envenas plendoj ke ne estas sufiĉaj instruistoj kiuj povas vojaĝi de lando al lando, gvidante Cseh-kursojn kaj tial la Instituto decidis aranĝi nomitan Seminarion.

## I.K.I. V.

Mi pensas ke la elkrio je la fino de la lasta artikoleto ankoraŭ resonadas en viaj oreloj, en via menso. Ĉar estas tiel, ke nenia granda laboro surtere estas efektivigebla sole per nia bona volo ; ĉiam ni bezonas la teran ŝlimon! Ankaŭ IKI ne povas elsaviĝi el tio. Sed-kiel havigi al si tiun necesan koton?! Mi denuncos tion al vi. Ĝis antaŭ nelonge tion prizorgadis precipe la nederlandaj katolikaj e-istoj, sed nun venis la tempo ke la tuta katolika e-istaro ĉie en la mondo devas helpi ilin en la financa subteno de nia granda, nia propra apostolado! En ĉiuj V.V.V.-nroj la sekr.-kasisto mencias la ricevitajn mondonacojn kaj abonkotizoj de la lastaj monatojn. Abonantoj de tiu revueto do mem povas konstati ke ĝis nun nur malmulte da subteno alvenas el ekster Nederlando. Mi scias ke el diversaj landoj oni ne povas sendi monon, de tie oni tamen povas sendi resp. kuponojn, kiel feliĉe jam kelkaj fervoruloj faras. Krome oni povis sendi sian subtenon al la landaj reprezentantoj de E.K. kaj al la adresoj menciitaj sur pĝ. 43 de EK-Okt.'53. Vi ankaŭ povas aboni VVV je ned. gld. 1,20 aŭ 6 resp. kup. jare.

Por subteni la daŭran kontakton kun la informpetintoj IKI je 1.3.1936 ekeldonis folieton „Vojo, Vero, Vivo". La unuaj 4 n-roj estis multobligitaj, ek de la 5a n-ro ĝi aperis presita en 8 paĝoj, ĉiudumonate, ĝis en Majo 1940 la milito ĉesigis ĉiun internacian E-laboron, do ankaŭ malhelpis la laboron de IKI. Tamen de 1941-45 envenis entute 9 informpetoj, en 1946 denove 10; tiam la sumo estis: 1005 petoj el 49 landoj. Nuntempe tiu nombro jam sumiĝas pli ol 2000 el 63 landoj. Kaj al ĉiuj petintoj IKI sendis i.a. la revueton VVV senpage! Ĉu ne vera mondapostolado? Kaj ĉu ni ne fierus doni al ĝi nian apogon, nian helpon per preĝo kaj mono?! La lasta peto de Frato Monulfo, la senlaca unua sekr.-kasisto de IKI, antaŭ lia subita morto 27-9-1953 estis: „Akcentu, akcentegu, ke ni bezonas multan monon, preskaŭ ĉiam nia kaso malprosperas." Mi kredas ke ĉi tiuj vortoj pli ol sufiĉas.

E. H.

*

## LA PASKA SURPRIZO DE LA ENMIGRINTO.

La fortmuskolaj labormanoj, simboloj de honesta metio, nun kuŝas interplektitaj sur la blanka littuko kaj ties posedanto, Franc Markon, reveme rigardas la plafonon. Malantaŭ lia lito staras oksigenaparato kiu devas malhelpi ke la malsanulo sufokiĝus: du maldikaj kaŭĉukaj tuboj kondukas la viportantan oksigenon tra la naztruoj en la pulmojn de la suferanto.

Li estas pensiulo de la Nederlandaj Ŝtataj Karbminejoj post 25-jara deĵorado kaj nun liaj pensoj formigras trans multajn landlimojn al sia patrujo: Slovenio, al sia naskiĝvilaĝo en la montaro, al la simpla sed fortika ligna domo kun larĝa galerio kaj li revidas la konatajn meblojn sur la ligna, pura, ĉiam polurita planko.

En 1926 grava ekonomia krizo estis kaŭzo ke miloj elmigris. Ankaŭ Franc Markon prenis la vojaĝsakon surdorse kaj alvenis en la malproksima Nederlando, kie en la limburga minregiono li povis perlabori bonan salajron.

Certe, li ne plendus sian sorton; li alkutimiĝis al la nederlanda vivmaniero, flue parolas la lingvon, eĉ gajnis bonajn amikojn en sia dua patrujo, sed tamen, se oni estas maljuna kaj malsana, la nostalgio obstine altrudas sin.

La flegistinoj komprenis tion kaj faris ĉion, por laŭeble kompensi tiun malplenon; sur la spegulo super la lavujo ili per sapo skribis: „Feliĉegan Paskon!" kaj ili estas tre afablaj al li...

Subite liaj revoj estas interrompataj: la pordo malfermiĝas, sacerdoto eniras dirante: „Blagoslavjeno Veliko Noc, Aleluja!" Aŭdante la paskan saluton en sia propra lingvo, la malsanulo eksidas kaj feliĉa rideto heligas lian vizaĝon dum li respondas „Aleluja!" Du virmanoj premas kaj skuas unu la alian kaj interparolado komenciĝas en la gepatra lingvo. La sacerdoto parolas pri la Restariĝo kaj la Vivo kaj pri la miraklo de ĝojnaskanta sufero. Eĉ ne unu vorto preterpasas la orelojn de Markon, lia animo avide trinkas la konatajn sonojn, kiuj ja tute alie efikas kiel prediko en la limburga paroĥa preĝejo, kvankam bone komprenita.
La sacerdoto estas samlandano, kiu post la lasta milito fuĝis el sia patrujo kaj nun kiel migranta Apostolo vojaĝas tra Okcidenteŭropo por viziti siajn samlandanojn, kiuj aŭ jam dum jardekoj, aŭ nur depost mallonge elmigris. Li nun troviĝas en la limburga minregiono por prediki dusemajnan Mision al siaj samlandanoj kaj kompreneble li ne forgesas viziti la malsanulojn inter ili.
Mallaŭte la ĉambropordo malfermiĝas kaj flegistino ŝtelrigardas dum momento la duopon. Ridetante ŝi tuj retiriĝas, pripensante kiel ŝi mem sentus sin, se post longa restado en fremda lando ŝi subite renkontus limburgan sacerdoton!

*

## INTERESA RADIO-PRELEGO PRI ESPERANTO.

Radio Alerta en Valencia, kies voĉo bedaŭrinde ne estas aŭdebla ekster Hispanujo, ĉiujaŭde elsendas dum duonhoro en aŭ pri Esperanto.
En ĉefartikolo la revuo de la Hispana Esperanto Asocio „Buletin" publikigas parton el prelego de unu el siaj redaktoroj, D-ro Rafael Herrero, el kiu ni ĉerpas jenajn nekutimajn pensojn pri la neceso de Esperanto: Ĉio estas relativa en ĉi tiu mondo. Oni povas vivi sen Esperanto same kiel oni povas vivi, kaj dum multaj jarcentoj vivadis, sen aeroplanoj, radio, preso kaj eĉ sen vagonaroj aŭ ŝipoj, kaj la generacioj kiuj tiam vivis, eĉ ne estis malfeliĉaj pro la manko de tiuj mirindaj eltrovoj, kiujn ili ja ne konis. Sed neniu nun tolerus la subpremon de tiuj instrumentoj, kiuj tiel profunde enradikiĝis en la moderna vivo.
Anstataŭ, kiel kutime, uzi demonstrativajn argumentojn por la utilo de Esperanto, ni agu laŭ la inversa metodo. Ni supozu — bedaŭrinde ne estas realeco! — ke depost multaj jaroj Esperanto jam estus oficiale kaj ĝenerale uzata por la internaciaj rilatoj; ke la diplomatio, la scienco kaj la tekniko ĝin konstante aplikus; ke en universalaj kongresoj oni ne uzus komplikajn, multekostajn kaj neperfektajn tradukprocedojn, sed parolus direkte en Esperanto, tiel evitante temp- kaj monperdon, erarojn kaj humiligojn; ke la medicino direkte kaj rapide utiligus tiun interesan lingvon kaj ne bezonus atendi la tradukon; ke la studento povus aŭdi kaj kompreni eksterlandan profesoron; ke la komercisto direkte korespondus kun firmao en malproksima lando; ke la aferoj de tutmonda intereso estus komunikigataj en la tutmonda lingvo. Resume, ke jam ke de multaj jaroj Esperanto estus kutima elemento de la kulturo kaj de homaj interrilatoj.
Ĉu oni povas pridubi kio okazus en la tuta mondo kiam pri iu infera fiagado tiu utila, racia kaj perfekta interkomprenilo estus subpremata? La homaro estus kiel duonsufokita per tia limigo kaj postulus la tujan restarigon de la subpremita lingvo. Oni certe povus kompari tiun enorman malplenon al la detruo de la elektraj centrejoj, de la eksplodiga motoro aŭ de la tuta kulturo de kelkaj jarcentoj! Do ne estas absurde rezigni tian utilan helplingvon?

*

## AKADEMIO DE ESPERANTO.

En la kadro de la 39-a Universala Kongreso de Esperanto en Haarlem denove okazos publika kunveno de la Akademio, en kiu la partoprenantoj havos la okazon direkti prilingvajn demandojn al la Akademio kaj libere diskuti pri lingvaj aferoj. Proponoj por la tagordo de tiu kunveno povas jam nun esti sendataj al la adreso de la adreso de la Akademio, sed ili devas atingi tiun adreson almenaŭ antaŭ la fino de Junio 1954. Ili povas esti duspecaj:

1. Oni povas formuli demandon pri iu lingva problemo rilata al Esperanto, pri kiu la Prezidanto kaj la aliaj ĉeestantaj Akademianoj donos sian opinion.

2. Oni povos mem enkonduki iun temon pri la lingvo Esperanto en la kunveno kaj defendi ĝin.

En ambaŭ okazoj povos sekvi liberaj diskutoj laŭ la disponebla tempo. Ĉar tiu tempo estos limigita la Akademio fiksos antaŭe la tagordon kaj elektos por tio la plej gravajn demandojn kaj temojn, fiksante ilian sinsekvon en la pritrakto. En la tagordo aperos ekskluzive demandoj kaj temoj de ĉeestantaj personoj.

*

## NOMOJ DE SANKTULOJ EN ESPERANTO III

7 Aŭgusteno — Aŭgustino.

Kiel venintaj el malnova batalo tiuj du frate staras unu ĉe alia ! Jam en jan. 1905 en la 2a jaro de E.K· p. 32 ni legas noton de Prof. A. Dombrovski :

„La nomo „Aŭgusteno" por francoj ŝajnos eble pli bona ol Aŭgustino ; sed por ĉiuj slavoj, germanoj, litovoj k.a. , la lasta formo estas preferinda, ĉar pli proksimiĝas al la naciâ elparolado de tiu ĉi nomo."

En la sekvanta numero p. 36 troviĝas respondo de L. de Beaufront, kiu atentigas al sia artikolo en L'Espérantiste de aŭg.-sep. 1898 kaj post tio al la noto de Prof. Dombrovski : „La kaŭzon kial Aŭgusteno estas aŭ ŝajnas elektinda prefere ol Aŭgustino mi vidas en tio, ke tiamaniere, por tiu ĉi nomo kiel por la similaj, ni povas facile kaj regule formi la inan nomon dirante Aŭgustenino, Justenino, Valentenino. Cetere ni tie imitas en la propraj nomoj, kion faris doktoro Zamenhof en la komunaj : mateno, ĝardeno."

En aprilo je p.52 Prof. Dombrovski daŭrigas kaj ne konsentas ! Ni ne bezonas Aŭgustenino aŭ Aŭgustinino, li skribas, kaj proponas Aŭgustino kiel unu traduko de Augustinus kaj Augustina. „Car la knabon povas la gepatroj nomi Aŭgustiĉjo, la knabinon Aŭgustinjo."

Jen la du ! Kaj jam montriĝas, ke ambaŭ posedas siajn rajtojn. Nur ekestas batalo, kie necesas elekto !

Ni unue konstatu, ke ne nur temas pri Augustinus. Ekzistas du serioj de latinaj nomoj de viroj, kiuj nur diferencas en tiu „ina" vortparto; kaj de ambaŭ oni latine povas fari virinajn nomojn:

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| Augustus | Augustinus | August | Augustina | Marcellus | Marcellinus |
| Marcella | Marcellina | Paulus | Paulinus | Paula | Paulina |

Miaopinie L. de Beaufront ĝuste defendas la regulan eblecon de ino-formoj por virinaj nomoj, kaj tiaj efektive troviĝas en la esperanta literaturo:

Johanino (K.R., „La Reĝo Judea" traduko de V. Devjatnin).

(Kiel ankaŭ en la franca lingvo: Philippe-Philippine, Gérard-Gérardine).

(Daŭrigota)

H. G. Wannemakers S.J.

*

## ALELUJA !

Kia dormo! — Ĉu ne, tio,
Senfina
De l'naturo morto?!..
Ve! Tro daŭra
Estas de l' Printempo
La vekiĝo!..

*

Tiel ploras la paseroj..

Jen! Elŝprucas nova Vivo!
Ĝojbrila,
Gaja triumfkanto!..
Jen, radia,
Iras la Printempo..
Suno, suno!!..

*

Tiel trilas nun l'alaŭdoj..

Triumfante rompis venko
Fulmanta
Tomban ejon.. Vivo
Lumglorega!!
Supreniras Kristo:
Eltombiĝo!

*

Jen, ĝojkrias Kristanaro..

Aleluja! Vivas Kristo!
Vibranta
Estu nia danko,
Kaj ardema:
Savis nin de l' morto
Nia Dio!

*

Kantelaŭdas l'Eklezio..

P. Louis Steinmetz O.f.m.Cap., Metz-Francujo.

*

## ANONCETOJ.

Por la prepara laboro koncerne la aperotan „Katolika Terminaro" mi bezonas la jenajn verkojn, kiuj ne plu estas aĉeteblaj: **Wüster, Oficiala Radikaro,** Berlin 1923, **Grosjean-Maupin, Oficiala Klasika Libro,** Parizo 1924; **Cart, Vortaro de la Oficialaj Radikoj de Esperanto,** Parizo 1922. Bonvolu skribi proponojn pri vendo aŭ pruntedono al: Patro Hubertinus OFM Cap., v. d. Does de Willebois-singel 12, **'s-Hertogenbosch,** Ned. ***

**Samideana Interhelpo.** Kiu volas helpi rifuĝintajn Esperantistojn? Relegu sept. n.ron 1953, p. 23 kaj skribu amase al „Ostpriesterhilfe. Esperanto Fako, **Saint-Vith,** Belgujo." Dankon al la jam respondintaj. ***

**Dez. korespondi** pri matematiko, natursciencoj, religio, muziko ktp. s-ro Rolf Nötel, Stiftstr. 11-II en **Karl-Marx-Stadt,** Germanujo DDR. ***

**Uzitaj poŝtmarkoj** de via lando ne havas valoron por vi, sed la Blankaj Patroj de la Afrikaj Misioj volonte akceptos ilin, speciale por havigi religiajn librojn al la misiistoj. Sendu al: Frato F. Majoel, Novicejo de la Blankaj Patroj, Maison Carrée, Algérie. Koran dankon jam antaŭe! ***

**Skolta Esp. Ligo** urĝe petas kiel eble plej multe varbi inter geskoltoj pere de paroladoj, kursoj ktp. en la sino de la skolta movado. Prenu kontakton kun la landaj delegitoj de S.E.L. aŭ rekte kun la ĝen. sekr. s-ro H. G. Bell, Bridlington School, Bridlington, Anglujo. ***

**Katolika instruisto** serĉas gekoresp. por siaj 24 lernantoj 10-11 jaraj. Adreso: s-ro Ŝtefano Koŝutiĉ, Adĵijina 10-II. ZAGREB, Jugoslavio. ***

*

## ESPERANTO VIVAS.

La Aŭstria Esperanto Federacio festos sian 50-jaran ekzistadon per jubilea kongreso de 5-8.VI. en Vieno. Honorprezidanto estos s-ro kort.kons. H. Steiner, direktoro de la Internacia Esp. Muzeo, dum s-ro Federacia Prezidanto D-ro H. C. Generalo Th. Körner estos la alta protektanto de la Kongreso. La aŭstria poŝto tiuokaze eldodos E. poŝtmarkon. Eksterlandaj s-anoj estos tre bonvenaj kaj ne bezonos pagi kongreskotizon. Adreso: Esp. Centro, Fünfhausg. 16, WIEN XV. ***

Dank' al la klopodoj de vicdirektoro D-ro K. Friedl la Stiria Landa Biblioteko en Graz (Aŭstrujo) instalis Esp. fakon, kie oni povas senpage prunti ĉiuspecajn klasikajn kaj novajn E.-verkojn. ***

Aŭstriano jam delonge nenion aŭdis pri sia fratino en Nairobi, Kenya (Maŭ-Maŭ-regiono). Post sensukcesaj klopodoj ĉe la Ruĝa Kruco kaj aliaj instancoj, nia s-ano K. Ryba skribis al la UEA-delegita en Nairobi, s-ro R. W. Rayner. Post 3 semajnoj alvenis leteroj de tiu fratino, kiu troviĝis en malsanulejo, kaj de s-ro Rayner, kiu tie vizitis ŝin. Esperanto ankaŭ ĉi tie helpis! ***

La franca tagĵurnalo NORD-ECLAIR provizore ĉesis la publikigadon de sia E-kroniko kiu estis la plej ampleksa el la franca gazetaro. Franclingvanoj bonvolu peti al la ĉefredaktoro regulan reaperon de la rubriko. Adreso: „Nord-Eclair", 27 rue Faidherbe, LILLE (Nord), tamen kompreneble ne menciante ĉi tiun alvokon. ***

*

## RECENZOJ.

**FERNANDO NERY: Rui Barbosa.** El portugala lingvo trad. Jozefo Joels. Eld. de Brazila Ministerio de Edukado kaj Sano. 294 pĝ.; bela papero, ilustr. Prezo ne indikita. Rui Barbosa, kiu vivis de 1849-1923 estis eminenta politikisto, advokato, oratoro, ĵurnalisto kaj beletristo. Ĉiujn siajn brilajn kvalitojn li metis je la servo de sia patrujo. Li estis senlaca batalanto por la abolicio de la sklaveco kaj poste por la federacia regsistemo. Vere unu el la plej eminentaj figuroj en la historio de la lasta jarcento! — Ni povas esti dankaj al la brazilaj aŭtoritatoj pro la eldono de tia grava verko en Esperanto. — T.D. x **

**HENRIK IBSEN: Peer Gynt.** El norvega lingvo trad. Erling Hausen. Eld. Rondo Norvegujo. 258 pĝ. Prezo broŝ. f 6, 25; tolbind. f 7,80. La famkonata majstroverko de eminenta norvega verkisto ne bezonas propagandon; la tradukinto bonege plenumis sian taskon kaj liveris poezion en tre komprenebla stilo. La enhavo taŭgas por maturaj plenkreskuloj. — T.D. **

**R. M. BALLANTIJNE: La Hundo Kruso.** El angla lingvo trad. J. M. Inman. Eld. Esp. Publ. Co. Rickmansworth. 150 pĝ. ilustr. Prezo f 1,75. Streĉaj aventuroj de blankaj ĉasistoj inter la Indianoj, dum kiuj inteligenta hundo ludas ĉefrolon. Bonega kaj simpla stilo. — T.D. **

**W. SHAKESPEARE: Trojlo kaj Kresida.** Proza trad. de Stephen A. Andrew. Eld. Esp. Publ. Co. Rickmansworth. 94 pĝ. Prezo f 1,50. La konata trage-komedio estas jam la 12a verko de Shakespeare tradukita en Esp. kaj s-ro Andrew denove faris grandan servon al la Esp. literaturo liverinte ĉi tiun perfektan tradukon: bedaŭrinde la lastan el pluraj de tiu verkisto, ĉar s-ro Andrew mortis en Nov. 1953 en la aĝo de 75 jaroj. — T.D. **